

& La prognozo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do;do dodo redo dodo doLa do Ti;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 En lito kuŝis malsanul' inerte. ;
Konsolis ĉiuj: "Vi saniĝos certe."

(×; **Venu mastrino en la2 ĉen' ;
Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 Sed venis kuracisto kaj decide ;
deklaris: "Vin ne trompu erarfide!

'3 Domaĝe, vi ne vivos ĝis mateno." ;
Post tio li foriris sen reveno.

'4 Sed tiu tamen el la grava stato ; iom
post iom elsaniĝis plene,

'5 kaj post monato iris al la strato ;
palvange kaj malforte, sed serene.

'6 Jen, venis kontraŭ li la eskulapo, ;
kaj, ege surprizite ĉe l' renkonto,

'7 ekkriis dum la skuo de la kapo ; "Ej!
Ĉu vi do revenis de l' Submondo?

'8 Kio do estas tie?" Paciento ; lia
respondis: "Paco kaj silento.

'9 La asfodeloj kreskas en abundo, ;
balzamon donas Lethe al korvundo,

'10 sed ... lastatempe, tamen, tre agacas
; Plutonon, ke tro bone jam kuracas

11 la kuracistoj; barko de Ĥarono ;
malplene pasas do tra Aĥerono.

'12 Kolere nun li prenas en registron ;
de ĉiuj kuracistoj la nomliston.

'13 Ne timu tamen! Mi kun ĵurinsisto ;
konfirmis: Vi ne estas kuracisto."